ANTAŬEN
suplemento de Informilo
1/22 MARTO 2014

❖❖❖

origamio instruis Larysa Osadchuk kun Anastasia Jemakova el Ukrainio. De Anna Striganova oni aŭskultis pri fabelaj mondoj, Dima Ŝevĉenko parolis pri libroeldonoj de la rusa eldonejo Impeto, Mikaelo Bronŝtejn rakontis pri spertoj dum siaj vojaĝoj al IF kaj dum la aŭtora horo li prezentis siajn verkojn, kiujn oni povis aĉeti. Kun Ljuba Malezh okazis "Posidelki" – teotrinkado kaj gustumado de dolĉaĵoj. Komputilado ĉiam pli kaj pli disvastiĝas ankaŭ en nia medio. Pluraj komputilis dum la evento. Okazis kelkaj vizitoj al la urbo, promenoj sur la urba murego, supreniro al la turo Daniel kaj vizito de la Rieskrater-muzeo.

Jam la sepan fojon efektiviĝis IVU-prelegoj: pri "Krateroj, Asteroidoj, Meteoritoj" parolis Bernad-Régis Larue, pri "Aŭroro – la nordia lumo" – Amri Wandel, la "Novparolon-Retrospektive" klarigis Ian Fantom, pri "Ĵurnalismo en Turkio" donis informojn Thomas Bormann. "Slovakio: modela EU-lando en interreta multlingva lingvo-instruado" prezentis Jozef Reinvart, vicambasadoro de Slovakio.

Aliaj prelegoj temis pri: diversaj kongresoj en Israelo, pri grimpado sur Akonkagvo laŭ la spuroj de Tibor Sekelj kaj pri Esperanto-informado en la interreta epoko. Ĉion tion prezentis Amri Wandel. Tatjana Loskutova prezentis tri landojn (Albanio, Serbio kaj Moldavio), kie ŝi prelegis pri Esperanto. Faktorojn de aĝiĝo klarigis Harald Schicke, preventon de ostoporozo Frank Nitzsche, kunlaboron kun la redakcioj el la vidpunkto de la ĵurnalisto traktis Alfred Schubert. Stefan MacGill parolis pri novaj ventoj ĉe UEA.

Ne mankis la kutima antaŭsilvestra programo "IF en retrospektivo". Brian Moon prezentis bildojn el la pasintjara IF en Dortmund. Oni povis rigardi fotoalbumojn el pasintaj IF-oj kaj interesajn trukfotojn de Klaus-Dieter Albrecht. Diskutrondon pri politiko animis Bert Schumann. Ian Fantom ludis pianon, tabloludojn iniciatis Nora Caragea. Libroservon prizorgis Alain Delmotte. Kelkfoje eblis ĝui surlokan saŭnon.

La tradicia Silvestra vespero komenciĝis per festa kaj luksa bankedo. Sekvis balo, inaŭgurata per polonezo sub la gvido de Barbara Muhlemann kaj jam kutima plurfoja festado de novjaroj... Vesperaj programeroj inkluzivis Jubilean programon, Operan kabaredon, Esperantan dancvesperon, Rusan bardan kulturon, koncerton de Nataŝa Bertze. Estis prezentita pupteatraĵo: Nuksorompilo. Dum la internacia vespero ni ĝuis buntan programon, al kies bona sukceso kontribuis la partoprenantoj mem. Ni aŭskultis kantojn, gitar- kaj pian-ludadon, skeĉojn, poemon. Ni spektis israelajn kaj bretonajn dancojn, ludadon de la korea instrumento jang-gu prezentis en nacia kostumo Song Jeon-ok. Al ekzamenitoj estis transdonitaj IVU-atestoj.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al la bavara urbo Rothenburg ob der Tauber. Post agrabla promeno tra la mezepoka urbo ni bone kaj abunde tagmanĝis en restoracio Ratsstube kaj poste ni povis ankoraŭ individue promeni. Ĉiuj ĝuis la etoson de la Internacia Festivalo. Por pluraj estis ĝojiga afero konstati, ke la IJF-oj ne finiĝis. Koran dankon al la ĉefa organizanto Hans-Dieter Platz, kiu dum 30 jaroj faris grandan laboron por la bono de ni ĉiuj. Do, tiuj, kiuj ne havis la eblon adiaŭi lin, povos tion fari ĉi-jarfine en Jülich. Venu ĝui neforgeseblajn jarfinajn tagojn kaj bonvenigi la Novjaron 2015!

Liba Gabalda

El fervoja mondo 2/14 Ĉeĥio:

Branĉtraka trafiko en Liberec revivis

La nordĉeĥa urbo *Liberec*, gastiginto de la 63-a IFEF-kongreso en 2011, estas konata pro sia ne tre ampleksa, tamen tre interesa tramtrafiko. La unuaj tramoj en la urbo komencis trafiki en la jaro 1887, kaj la tramvojreto iom post iome kreskis.

En 1950-aj jaroj la tramvojreto estis kompletigata je interurba linio iranta tra *Vratislavice* kaj *Proseč* al la urbo *Jablonec nad Nisou*. En la jaroj 1990–2005 la urba linio estis alikonstruata por normala ŝpuro de 1435 mm kaj la linioparto *Lidové sady – Viadukt* ricevis tri relojn, por ebligi ekspluatadon de ambaŭŝpuraj veturiloj sur la sama trako.

En la 1990-aj jaroj estis klare, ke se trama trafiko deziras konservi siajn klientojn, devas alkonformiĝi al modernaj evolutendencoj. Tio koncernis

plejparte la trafikon de basplankaj veturiloj. Pro tio printempe en 1998 aperis en *Liberec* relative unika veturilo – tramo *RT6S*. Tiu ĉi de aliaj veturiloj *RT6N* diferencis koncerne uzon de alia ekipaĵo, kaj precipe de malaltigita basplanko al la boĝioj de la randartikoj. Post la konstruo en la entrepreno *ČKD* ĝi ĉirkaŭ unu jaron (1997-1998) provtrafikis en *Praha*, kaj fine de la jaro 1998 ĝi komencis transporti pasaĝerojn en *Liberec*.
Bedaŭrinde, la tramo ne estis tre fidinda por regula ekspluatado. Okazadis problemoj kun elektra ekipaĵo, hidraŭlika bremso de meza boĝio *Duewag*, problemoj ĉe pordoj, rapida defrotiĝo de radringoj ktp. La tramo estis ofte portempe elservigita, krome post bankroto de la fabrika firmao *ČKD* – estis neniu, kiu tiujn „infanmalsanojn“ povus forigi. La trafika oficejo poste ne aprobis la tramon por regula ekspluatado. Kun pasaĝeroj ĝi lastfoje ekveturis la 25-an de novembro 2003, depost tiam ĝi staris eltrafikigita en veturilbontenejo en *Liberec*. Komence do oni pripensis loki ĝin en iu muzeo, post longaj dek jaroj ĝi estis vendita al la kompanio *EFA, EDGE FOR ALL s.r.o.* en *Lánov*, kiu okupiĝas pri gastigado kaj liveras servojn kunligitajn kun vintraj sportoj.

En decembro 2013 do denove revivis trafiko sur branĉtrako de *DPML* – la trafika entrepreno de la urboj *Liberec* kaj *Jablonec nad Nisou*, kiu estas rekta daŭrigo de la klienta trako *Babylon* (*Babilono – la* kongresejo de la 63-a IFK) ekde km 0,108. La branĉtrako de la trafika entrepreno mem estas 272 metrojn longa. Sur ĝi ne plu okazas transportoj. En pasinto ĝi estis uzata por transporti tramojn el la trafika entrepreno *Liberec* en bontenejojn de trafika entrepreno en *Ostrava*. Inverse en pasintaj jaroj al la branĉtrako estis transportataj reloj por renovigo de la urba linio.

La lasta priservo de tiu ĉi branĉtrako okazis en novembro 2010 kaj kiam en spaco proksima al la amuza centro *Babylon* aperis „Elektra metroŝtono“ 743.007 *ČD Cargo*, temis pri relative grava okazaĵo. Sur la branĉtrakon estis aldonataj du varvagonoj serio *Res*, sur kiujn estis metita tramo RT6S dividita en du partojn. Sur la trakoj *DPML* kaj *Babylon* la menciitaj vagonoj venis al la fervoja stacio en *Liberec*, de kie ili per regulaj trajnoj *ČD Cargo* estis transportataj al *Vrchlabí*. El la tiea stacio la tramo estis transportata al *Herlíkovice*, kie ĝi nun servas kiel atentovekilo por loka skitereno. Laŭplane la tramo estos transformita al kafejo aŭ skiservejo.

Preparis *Jindřich Tomíšek*, reviziis *Heinz Hoffmann*